# esperanto aktuala

*Revuo de la Esperantista Brusela Grupo* *Numero 3 / 2022*



Sezonfina manĝo ĉe Kriti en Junio

Vivu Ukrainio

## Baldaŭaj eventoj

- Prelegoj de B-R LARUE
- Babilemaj ... Nudeloj 🇹🇭
- Zamfesto en Ostendo
- Malkovro de la artaĵoj en la metroo far de belgaj artistoj
- IFEF-Kongreso (Antverpeno)
- Postkongreso en Karloreĝo



Restarto de « Babilemaj... Spagetoj » en Rugantino 🇮🇹 kaj poste en Kabuki 🇯🇵

# Eventoj kiuj okazis antaŭ nelonge ĉe EBG (kaj ankaŭ rete)




Fine de la 15a jarcento, la portugaloj kaj hispanoj malfermis vojojn al Ameriko, Afriko kaj Azio. Tial en la 16a jarcento, ili produktis mapojn pri tiuj teritorioj, novaj laŭ la Eŭropanoj. Ankaŭ la italoj kaj turkoj produktis tiajn mapojn.




En Normandio, en la 16a jarcento, aperis la skolo de kartografio de Dieppe. Dieppe estis tiam grava haveno de Francio, ankaŭ startpunkto de ekspedicioj por malkovri forajn teritoriojn. La membroj de tiu skolo produktis mapojn kaj atlasojn bazitajn sur Portugalaj modeloj, plej ofte mane desegnitaj, kaj riĉe ilustritaj, por elstaraj klientoj. Aparte notinda estas la ofta reprezentado de Aŭstralio… dum la Eŭropanoj malkovros ĝin nur en la posta jarcento!

# K O L O F O N O

42a ELDONJARO. Aktuala estis fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de EBG - Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita la 10an de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo « Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge » kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: JM Nicolas de Buyl: aktuala@esperantobruselo.org ; Aktuala elŝutebla: sites.google.com/site/ebgaktuala/ ; Prezidanto: Bernard-Reĝis LARUE : prezidanto@esperantobruselo.org , Kasisto: Jan Amadori : jan.amadori@gmail.com Sekretario: Ivo DE KEYZER : sekretario@esperantobruselo.org, Informoj/kursoj: Françoise Pellegrin: fransuaz@esperantobruselo.org Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org
Abono kaj membriĝo: Vidu la kotiz-tabelon, konto: IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC: TRIOBEBB de Esperantista Brusela Grupo, EBGa retejo: www.esperantobruselo.org, Fesjbukpaĝo: Esperanto Bruselo, group-io: Esperanto en Bruselo, Kunvenejo: « De Pianofabriek », Rue du Fort-straat 35, 1060 Bruselo, M Parvis de St-Gilles/St-Gillis

# A G E N D O

*Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn rete sur la Kalendaro de la Brusela grupo sur nia retejo*

***Kursoj kaj kunvenoj okazas ĉiumarde*** *en* ***De Pianofabriek****, 35 rue du* ***Fort****straat, 1060 Bruselo.*
*Informoj ĉe fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28*

***EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,***
***bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981***

**Porkomencanta kurso kun Adam Brooking ekde la 31a de Januaro 2023 ĝis la 20 de Junio 2023.**
La 2a sesio de tiu okazos ĉiumardon **krom** la 4a kaj 11a de Aprilo, 2023.
Normale en Casablanca 1 (De Pianofabriek). Informoj : kresko@esperantobruselo.org aŭ 0478 072 151

## NOVEMBRO

| | | |
|---|---|---|
| Mardo la 22a | 18:30 - 20:00 | Prelego de Bernard-Reĝis LARUE pri Kartografio (6) « La skolo de Dieppe » |
| Mardo la 29a | 18:30 - 20:00 | Paroliga vespero laŭ temo decidota |

## DECEMBRO

| | | |
|---|---|---|
| Mardo la 6a | 18:30 - 20:00 | Prelego de Bernard-Reĝis LARUE pri Kartografio (6) « La skolo de Dieppe » **(2)** |
| Vendredo la 9a | 12:15 - 14:30 | Babilemaj…Nudeloj en taja restoracio Perle DE SIAM (informoj paĝo 20a) |
| Mardo la 13a | 18:30 - 20:00 | Bernard-Reĵis LARUE prezentos sian vojaĝon al la UK de Montrealo **(2)** |
| Sabato la 17a | 12:00 - 18:00 | Tutbelga Zamfesto en Ostendo |
| Mardo la 20a | 18:30 - 20:00 | Paroliga vespero laŭ temo decidota |

## JANUARO

| | | |
|---|---|---|
| Mardo la 10a | 18:30 - 20:00 | Paroliga vespero laŭ temo decidota |
| Mardo la 17a | 18:30 - 20:00 | Paroliga vespero laŭ temo decidota |
| Sabato la 21a | 14:00-17:00 | Promenado en la metroo de Bruselo por malkovri ties artaĵojn faritaj de belgaj artistoj |
| Mardo la 24a | 18:30 - 20:00 | B-R LARUE prelegos pri Kartografio 7: Ĝermanaj mapoj ĉirkaŭ la 16a jc. |
| Mardo la 31a | 18:30 - 20:00 | Babilkunveno laŭ temo decidota |

## FEBRUARO

| | | |
|---|---|---|
| Mardo la 7a | 18:30 - 20:00 | Paroliga vespero laŭ temo decidota |
| Mardo la 14a | 18:30 - 20:00 | Paroliga vespero pri libroj pri Amo kaj amorado en esperanto, okaze de Valentena festo? |
| Mardo la 21a | 18:30 - 20:00 | Babilkunveno laŭ temo decidota |
| Mardo la 28a | 18:30 - 20:00 | B-R LARUE prelegos pri : Ĉu Henri Lafontaine parolas Esperanton? |

## Enhavo


Paĝo 2a : Kartografio 5 kaj UK-Montrealo
Paĝo 3a : Kolofono /Agendo
Paĝo 4a : Enhavo
Vorto de la Prezidanto
Paĝo 5a : En la movado
• BeNeLuksa Kongreso 2022 en Ieper
Paĝo 6a : • Babilemaj…Spagetoj
Ni gastigis ukrainajn rifuĝintojn…
Paĝo 9a : Okazis la 107a UK en Montre
Paĝo 12a : Ĉu vi konas la Savanobestojn?
Paĝo 13a : Ĉu vi konas la Ĝangalobestojn?
Paĝo 14a : EBGa Kotiztabelo 2022
Paĝo 16a: Tutbelga Zamfesto en Ostendo
Nomoj de la bestoj (solvoj)
Paĝo 17a: Taja salato kun mango kaj salikokoj
Paĝo 18a: IFEF-Kongreso de fervojistoj (Antverpeno)
Postkongreso en Charleroi
Paĝo 19a : Nia plantangulo: Borago oficina
Paĝo 20a : Venontaj eventoj ĉe EBG


## Vorto de la prezidanto



Karaj,

Jen nova akademia jaro !

Kaj tuj ni havas grandan novaĵon : eklaboris nova instruisto !
Temas pri Adamo. Li jam instruis antaŭe dum kelkaj rapid-kursoj.

Kaj li alportas novan dinamikon al nia grupo. Jam li montras al junuloj kiuj interesiĝas pri Esperanto ke estas afero ne nur por maljunuloj. 😉 Li komencis kun tri studentoj, eble havos pli da en la postaj semajnoj.

Fransuaz certe povus daŭrigi sian rimarkindan laboron en tiu posteno, sed ŝi jes deziris iom ripozi, foje foresti, kaj transdoni la taskon al nova generacio. Ni ĉiukaze ege dankas ŝin pro sia longa dediĉo, kun tiom da talento. Kaj pro la subteno kiun ŝi plu provizas al Adamo.

Nun ke la virusoj ŝajne lasas nin vivi iom pli normale, iĝas tempo reaktiviĝi! Dum la unua renkontiĝo de septembro, ni interŝanĝis kelkajn dezirojn por tiu-ĉi jaro. Ni deziras unue relanĉi la « Babilemajn Spagetojn », sed kun kelkaj adaptoj. Memoru ke temas pri monataj neformalaj renkontiĝoj en restoracio, kie plej gravas retrovi sin en bona etoso. Ankaŭ ne esperantistoj estu bonvenaj, por iom informi ilin, kaj montri ke la lingvo bone funkcias. Do kion adapti ? Ni devas trovi taŭgan tagon : kiam ni kunvenis merkrede vespere, la lundo taŭgis por manĝi kune, sed nun ni kunvenas marde, kaj renkontiĝi sinsekve lundon kaj mardon de la sama semajno, aŭ mardon kaj merkredon, ŝajnas iom tro. Do eble ĵaŭde. Ankaŭ ni pripensas tagmanĝi anstataŭ vespermanĝi, ĉu foje ĉu regule, tiel ke tiuj kiuj ne tro emas fari longajn trajektojn vespere, ĉefe vintre, ankaŭ povu veni. Kaj ni deziras provi diversajn restoraciojn, anstataŭ glui al la sama eterne. Tiel la unua okazis la 6an de oktobro en Rugantino, la dua « Babilemaj … suŝioj » en Kabuki kaj la tria okazos en Perle de Siam .

Promenoj daŭre interesas nin, sed ni devos konfirmi kiu povus gvidi nin, kiam, kie. Ne hezitu proponi vin !

Cetere ni ŝatus trovi kiel bone propagandi por Esperanto, ĉar ni ja konstatas ke la nombro de novaj kursanoj ŝrumpiĝas lastatempe. Antaŭ kelkaj jaroj ankoraŭ aperis 'spontane' deko da interesatoj, sen ke ni vere devu strebi, sed tio ne plu okazas…

Praktikaj ideoj serĉataj ! Kion vi proponas ?

Ni foje organizos ludvesperojn, por doni iom da variado al niaj mardaj kunvenoj. Ni ankaŭ daŭrigas kutimajn programerojn : tio estas marde la kursoj, la prelegoj, la fojfoja ordigado kaj maldikigo de nia biblioteko, la babilaj vesperoj kiam ne estas specifa temo. Kaj la aperigo de nia kara revuo, kiel vi konstatas sub viaj ravitaj okuloj ! Ankaŭ al ĝi ne hezitu partopreni, iel ajn.

Vi certe havas ion interesan por dividi kun ni ! Feliĉan novan akademian jaron !

Via prezidanto, Bernard-Régis LARUE.

## En la movado …

### ★ *BeNeLuksa Kongreso 2022 en Ieper, de la 23a ĝis 25a de Septembro*

Sukceso de kongreso ĉiam komenciĝas per bona loko. Nicky kaj An trovis tute taŭgan junulargastejon en Ieper. Estis diversaj tipoj de ĉambroj, eble ĉefe por 4 kun litoj individuaj, supraj kaj subaj. Ni ankaŭ bone manĝis tie, inkluzive de belga specialaĵo : volovano (kaj kelkaj eksterlandanoj tre miris pri tiu plado).



Vleeshuis, en kiu okazis la publika prezentado de Esperanto kaj atelieroj pri paco

Ieper + septembro estis bona elekto por nia kongreso, ĉar ni povis kombini ĝin kun paca evento: la 21a de septembro estis la Internacia Tago de la Paco, kiam Unesko proponas korusan pac-festivalon ĉie en la mondo. Tiukadre koncertis en Ieper en la sabato la solidareckoruso "Vamos pra Lutar", kies membro estas Piet Glorieux, esperantisto el Kortrijk, kaj kunorganizanto de nia kongreso. Tiu posttagmezo estis dediĉita al ekstera publiko : unue prezento de Esperanto por la publiko en tre bela malnova domo de la municipo « Vleeshuis », far Kiki. Tiam Piet intervjuis per videokonferenco Taeko Osioka, japanino el Hiroŝimo, kiu ĉiam okupiĝis pri civitanaj agadoj kontraŭ nukleaj armiloj. Poste venis la koncerto en plenplena preĝejo, kun kantoj en pluraj lingvoj, inkluzive de klare menciita Esperanto. Inter la du okazis paŭzo por la esperantistoj, kun kukoj kaj regionaj bieroj, kaj poste ni ĉeestis la « Last Post », ceremonion por la mortintoj de la unua Mondmilito.




La koruso Vamos Pra Lutar dum la pacokoncerto, kun Piet maldekstre

En la tri matenoj oni povis aŭskulti prelegojn rilate al paco, ofte de prelegantoj kiuj venis de for : Xavi Alcalde estas kataluna historiisto, kiu multe publikigas en diversaj lingvoj pri pacismo kaj esperantismo ĉirkaŭ la unua Mondmilito. Li prezentis multajn agadojn de la esperantistoj en tiu epoko. Mi cetere rekomendas la libron kiun li kunmetis kun José Salguero: « Antaŭ unu jarcento. La granda milito kaj Esperanto. » Mireille Grosjean, el Svislando, gvidis atelieron pri konfliktosolvado. Kaj Bernard-Régis, el Germanio, prelegis pri Pacifistoj kiuj iĝis esperantistoj.

Li refaros tiun prelegon en Bruselo, en du partoj, en februaro kaj junio. Ankaŭ Yannick Vercammen prelegis pri kemiaj armiloj dum la Unua Mondmilito.

Elstaris spektaklo de Heidi Goes (B) kaj Abel Massiala (Kabindo, Angolo) en la vendreda vespero. Ŝi deklamis poemojn de la unua Prezidento de Angolo, tradukitajn al Esperanto, interplektitaj kun gitara muziko de Abel. Li kantis en diversaj lingvoj, proprajn kantojn kaj kantojn de aliaj. Tre bela kombino !

Krom la jam citita ateliero de Mireille, estis aliaj atelieroj, pri origamio, ŝtofofarbado kaj ludado de citro = popolmuzikinstrumento kun kordoj.

Ne mankis kursoj de Esperanto, je du niveloj, far Kiki kaj Gunter Neue (el Germanio). Nek la libroservo de FEL evidente. Ni fine menciu ekskursojn, piede kaj bicikle. Klare riĉa programo !

Ĉeestis pli ol 70 homoj, ne nur el Benelukso (kiel vi jam legis), sed cetere el Francio, Germanio, Svislando kaj Hispanio. Bela sukceso !

*Raportis Bernard-Regis LARUE*

## ★ *Ni startis novan serion de Babilemaj … Spagetoj*

Post la vesperaj « Babilemaj Spagetoj » kiuj okazis antaŭ la pandemio, ni startas novan serion kiu estos iom malsama en la senco ke ili ne plu okazos nur vespere en unu nura loko, sed estonte kelkfoje tagmeze (ĉar iuj personoj ne ŝatas veni en la urbon kiam malheliĝas pli specife dum la aŭtuno kaj vintro) kaj kelkfoje vespere, kaj plie de nun en variaj lokoj.

Ni jam vizitis la restoracioj RUGANTINO (itala), KABUKI (japana) kaj vendredon la 9an de Decembro ni denove tagmeze vizitos PERLE DE SIAM. Nepre rezervu via(j)n loko(j)n ĉe [nikolao-ĉe-esperantobruselo.org](nikolao-ĉe-esperantobruselo.org) plej laste la tagon antaŭan je la 12a horo.






*Nikolao de Buyl (Fotoj Bernard-Regis LARUE)*

# Ni gastigis ukrainajn rifuĝintojn fine de Aprilo 2022



Ni havis disponeblan dormoĉambron en nia unufamilia hejmo kaj akceptis en ĝi, dum tri monatoj, paron de ukrainaj rifuĝintoj kaj krom tiu dormoĉambro, ni kundividis niajn kuirejon kaj manĝoĉambron.

Kun ili, tre amikemaj homoj, la konekto tuj establiĝis, sed por komuniki, ekestis grava problemo. Ili ja estas dulingvaj sed nur en la rusa kaj ukraina. Krom eble maksimume 30 vortojn, ili ne konas la anglan kaj cetere ankaŭ ne iun ajn alian lingvon.

Komuniki per piktogramoj? Por aferoj kiel – « Kie mi povas lavi la manojn », tio funkcias, sed por pli subtilaj aferoj, kiel: – « Ni sugestas, ke vi ĉeestu ĉi tiun koncerton, sed ne sentu vin devigataj akcepti » tiu sistemo iĝas multe pli malfacila, eĉ tute senutila.

Feliĉe estas aplikaĵoj en saĝtelefonoj, kiuj kapablas rapide traduki frazojn de unu lingvo al alia. Por tiuj aplikaĵoj, necesas havi funkciantan Interretan konekton por obteni akcepteblajn kaj rapidajn rezultojn.

- **Unua problemo**: La aplikaĵo devas kapti bone, kion oni diras, alie, ĝi tute ne reflektas la penson.
- **Dua problemo:** La aplikaĵo devas traduki ĝuste ĉar estas homofonoj, kiuj signifas tre malsamajn aferojn.
- **Tria problemo:** La kontraŭa persono devas ankoraŭ kompreni ĝuste tion, kion la aplikaĵo montras aŭ elparolas al ŝi aŭ li.

Kiel fari praktike ? Elparolu malrapide kaj klare plejeble simplajn kaj mallongajn frazojn. Evitu tro buntajn aŭ adverbajn frazojn. Ekzemplo: Ne diru: – « Ĝi ne estas tiel facila, kiel laboro argila », sed diru – « Estas pli malfacile ». Poste, kiam vi pensas, ke vi komprenis, reformulu, kion vi komprenis por esti certa, ke ĝi konformas al kio celis via alparolanto.

Foje oni ridas multe, jen spertitaj ekzemploj:

– « Mi aĉetos botelon por malaperigi vin » aŭ « Bandito miregas, se vi estas kalva ».

Do, poste necesis reguligi la administran situacion de niaj gastoj, jen alia defio.

Ni iris al la Registrejo instalita en halo de la Ekspoziciejo (Heysel/Heizel) por peti provizoran protekton kiel militaj rifuĝintoj el Ukrainio. Ili montris sian pasporton kaj ricevis « Provizoran Protektan Atestilon »[1]. Tiu dokumento permesas onin esti en bona administracia stato ĝis la ricevo de la provizora restadopermesilo, nomata « Karto A ».

Intertempe ni iris al la « Sociala Servo »[2] de la municipo por registrigi ilin kaj tiel ebligi ilin profiti de la « Sociala IntegriĝoEnspezo »[3]. Jen nova problemo ĉar por tio ili bezonis la Nacian Registronumeron kaj havis nur provizoran numeron. Sed tiun Nacian Registronumeron oni ricevas nur kiam la Karto A estas jam akirita. Plie ĝi estas necesa ankaŭ por malfermi bankokonton por la pagoj el la Sociala Servo.

Ni provis registrigi ilin en Sanasekura kompanio, sed ankaŭ por tio necesas havi bankokonton por la repagoj.

Oni rekomendis registrigi ilin en lingvokurso.
Registriĝa provo en Lernejo pri Sociala Promocio de municipo de Bruselo.

Estas marde inter la 12a kaj 13a. Ni alvenas je la 11a30 por esti en la unuaj, sed jam estas multaj homoj. Tagmeze, malfermo de la pordoj kaj 150 homoj eniras klasoĉambron. Aliĝilo devas esti kompletigita. Ĝi estas en la franca kaj skribita per latinaj literoj. Ĉi tio estas normala en Belgio, sed por ukrainoj rusparolantaj, kiuj havas cirilan alfabeton, estas pli malfacile. Helpe de traduka aplikaĵo, ni sukcesas plenigi ĉiujn kampojn, sed ni estas malproksime de la vickapo. Kun fotokopio de la formularo, pasporto kaj Provizora Protekta Atestilo enmane kaj post rapida testo pri kompreno de la franca lingvo, la registriĝo estas akceptita ĉe la porkomencanta nivelo kaj bonŝance tiuj kursoj estas senpagaj por ukrainaj rifuĝintoj.

[1] *Attestation de Protection Temporaire (FR) / Atest Tijdelijke Bescherming (NL)*
[2] *CPAS / OCMW - Publika Centro pri Sociala Helpo*
[3] *Revenu d'Intégration Sociale (RIS) / Leefloon*

Laŭ la konsilo de la Sociala Servo, ni iris al banko kaj petis rendevuon, ni povis malfermi konton por ĉiu, sed, … ho surprizo, ĝi estis nur provizora registriĝo, ĉar sen Nacia Registronumero, la konto ne povas esti uzata.

Plie la Sociala Servo kaj Sanasekuro povus ekfunkcii nur kun valida Nacia Registronumero.

Por akiri Karton A, ni devis iri al la administraciejo de nia municipo kun pasporto, identecaj fotoj kaj Provizora Protekta Atestilo. Oni ne tuj ricevas Karton A, sed anstataŭe ili ricevis « Aneksaĵon 15 », kiu permesas resti dum unu monato antaŭ la akiro de la Karto A, sed ĉi tiu Aneksaĵo 15 ankoraŭ ne provizas la Nacian Registronumeron.

Post kelkaj tagoj, la urba administracio petis nin veni. Ni iris tien, sed ne estis por liveri la Karton A, sed por registri iliajn fingrospurojn kaj subskribojn.

Tre amika policisto venis tri tagojn poste por vidi ĉu ili vivas bone kun ni kaj se la loĝkondiĉoj estas decaj. La belga registaro devas efektive kontroli, ke ni ne estas « filoĝigistoj »[1], tio estas, ke ni ne prenas malhonestan profiton per luado de simplaj matracoj al enmigrintoj.

Kelkajn tagojn poste, ni reiris al la municipo kaj post nova kolekto de iliaj fingrospuroj, ili ricevis sian Karton A kun la tiom atendita Nacia Registronumero. Fakte, Karto A estas elektronika identigilo, kun la fama numero, kiu  permesas limigan restadon de unu jaro.

Ni reiris al la banko kaj finfine ili havis sian konton kaj bankokarton kaj sekve ili povis ricevi monon de la Sociala IntegriĝoEnspezo, registriĝi por la Sanasekuro kaj serĉi propran loĝejon.

Por la elektita Sanasekura kompanio, estis absolute necese fari peton pri registriĝo skribe kaj per poŝto. Ni faris ununuran peton por geedza paro. Unu-du semajnoj poste, ni havis la vinjetojn kaj surprize, nur la edzo estis kovrita. Post telefonalvoko donanta dum 20 minutoj mesaĝon kiel – « Ĉiuj niaj dungitoj estas okupataj, bonvolu atendi… », ni eksciis, ke la Aneksaĵo 15 mankis por la virino kvamkam ĝi ja estis en la antaŭa poŝta sendo. Ni sendis ĝin denove.

Post kelkaj tagoj, nova telefonalvoko (– « Ĉiuj niaj dungitoj (…) atendi… »), ni eksciis, ke por ukrainaj rifuĝintoj, fakte necesis sendi peton por ĉiu homo individue eĉ se ili estas geedziĝintaj.

Nova sendo por la virino kaj post kiam ni iris tien kaj telefonis plurfoje, la bona novaĵo alvenis: ankaŭ la sinjorino estas nun kovrita kaj profitas de la statuso « Profitanto de Plialtigita Interveno »[2].

Pro ke tiu paro ne volis dependi tro multe de nia helpo, la Sociala Servo rakontis al ni pri disdonservo de korboj da manĝaĵoj, sed por profiti el ĝi senpage ili devis loĝi sendepende. Aliflanke ni eksciis, ke grupo de volontuloj distribuas en la najbara municipo korbojn da manĝaĵoj po 1 € por korbo por persono. Ni iris tien kaj ekde tiam ili povis sendependiĝi ankaŭ koncerne nutraĵon.

La Sociala Servo rapide ekfaris la pagon de la Sociala IntegriĝoEnspezo. Do ili ankaŭ povus aĉeti ĉiujn aferojn, kiujn ili bezonis: ŝampuon, telefonan abonon, ktp.

Kun la Karto A kaj la bankokonto, ni povis iri konsulti okulan kirurgon ĉar la virino havis katarakton en ambaŭ okuloj. Ŝi nur per lupeo kapablis legi kaj tiele tamen asidue sekvis la

[1] *Marchands de sommeil / Huisjesmelkers / Slumlords*

[2] *BIM - Bénéficiaire d'Intervention Majorée / BVT - Begunstigde van een Verhoogde Tegemoetkoming*

francajn lecionojn. Sed kiam ni iris la unuan fojon, la Sanasekuro ankoraŭ ne jam estis tute en ordo sekve neeblis fari rendevuon por la duobla operacio. Nur post konfirmo de la Sanasekura kompanio, ni fine povis peti tiun rendevuon.

Niaj gastoj volis trovi loĝejon sed nur per la Sociala IntegriĝoEnspezo, estas jam afero malfacila, sed en nia municipo, estis eĉ neeble trovi ion akcepteblan je prezo por ili pagebla. Kaj kiel fari por samtempe ŝanĝi la municipon, konservi la garantion de la Sociala Servo de nia municipo ĝis ties translokigo al tiu de la nova municipo, sen interompi la Socialan IntegriĝoEnspezon ?

Estis neeble sen refari ĉiujn administrajn procedojn: la ŝanĝo de adreso de unu municipo al alia estas facila, sed poste necesas registriĝi por la Sociala Servo de la nova municipo kaj atendi favoran decidon. Sed sen vere jam loĝi en la nova municipo, ne eblas esti helpata de la Sociala Servo de tiu municipo kaj sen tiu helpo, ne eblas lui loĝejon.

Mallonge, unue estus necese trovi familion en la alia municipo, kiu konsentas bonvenigi ilin kiel ni kaj refari preskaŭ ĉiujn paŝojn, kiujn ni jam ĵus faris.

Sed mirakleto okazis ĉar ni trovis malgrandan loĝejon renovigitan je prezo, kiun ili povus pagi, kaj ĉi tio en nia municipo !

*Raportis Yves De Keyzer*

*Tiel, en Belgio, oni simpligas demarŝojn por la enmigrintoj ukrainaj !*

*Komento de Nikolao de Buyl*

# Okazis la 107a UK en Montrealo

Kaj ni, Aleksandra kaj mi, havis la ŝancon partopreni…

Mi ja devas konfesi ke mi partoprenis malpli ol kutime: jam mi devis foriri la ĵaŭdon tagmeze, por iri al geedziĝa festo de mia filino Aurore, sed cetere estis multaj alternativoj en tiu tre interesa urbo.

Mi iom skizu kion ofertas UK-oj ĝenerale, kaj aparte ĉi-tiu.



Unue ni notu ke dum UK kutime oni proponas plurajn apartajn programerojn por la junuloj. Tio ne mankis ĉi-foje, kaj ni vidis ilin tre gajaj. Chelsea ekzemple raportas pri tiaj programeroj en sia Youtube-kanalo (Chelsea Rae Moses).

En UK estas kelkaj kutimaj solenaĵoj, kaj ili ne mankis. Sed ili ankaŭ evoluas : ekzemple dum la inaŭguro, la landoj ne plu salutas individue, anstataŭ la kontinentoj salutas sed tio laŭ la komisionoj de UEA, tiel ke ankaŭ Mez-Oriento estas aparte konsiderata.

Tradicie ankaŭ ĉiam eblas meti demandojn kaj ricevi respondojn, de la Estraro unuflanke, kaj de la Akademio aliflanke.

Pluraj komitatoj kaj komisionoj de UEA ankaŭ kunvenas.

La unuan tagon, sabate vespere, okazas jam tradicie Movada Foiro : tiam oni malkovras larĝan parton de la ofertoj de la movado : kelkajn naciajn federaciojn kiuj proponas ion specifan, fakajn asociojn, eldonejojn, gazetojn, ktp.

Okazas cetere la ĉefa jara renkontiĝo de kelkaj fakaj asocioj.

**Mi ĉiam tre interesiĝas pri prelegoj.**

Ili grupiĝas en pluraj kategorioj:



- Estas universitataj prelegoj, plejparte far universitataj profesoroj. Ĉiam Amri prezentas serion pri astronomio, ĉi-foje pri la nova James Webb teleskopo, temo kiun mi ŝatus mem prezenti baldaŭ al vi. Mi sekvis ankaŭ plurajn prelegojn pri geologio.
- Kleriga lundo : 9 prelegoj aŭ atelieroj plej diversaj : multlingvismo, Irako, ploro, viskio... Mi sekvis inter alie Xavi Alcalde, kiu prelegis pri kiel serĉadi pri historio de Esperanto.
- Estas « scienca kafejo », kie la prelegantoj proponas pli mallongajn prelegojn, de ĉ 30 minutoj. Tie Kiki prelegis pri la lingva situacio en Bruselo, tiel ke oni povu kompari ĝin kun la situacio en Montrealo aŭ aliaj partoj de Kanado.
- Ĉiam estas serio da prelegoj pri la gastiganta lando. Ĉi-foje 9! Pri ĝia historio (ja pro la mallonga formato, tro similas al vikipedia paĝo...), pri la lingvoj, pri la Esperanto-historio.
- Estas cetere diversaj aliaj prelegoj. 10 ĉi-jare, pri matematiko, falsaj novaĵoj, anarkiismo, ktp.

La kongresa temo ŝajnis al mi pli interesa ol en aliaj jaroj: ĉi-foje temis pri « Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj ». Ĝi estis traktita tra 6 grandaj prelegoj kaj atelieroj, sub gvidado de Mark Fettes. Ĉi-jare komenciĝas Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, lanĉita de UN kaj Unesko.

Ankaŭ eblis ekskursi al indiĝena vilaĝo, kaj al multaj diversaj lokoj de la regiono. Kutime mi partoprenas kelkajn ekskursojn, sed ĉi-foje ni trairis Kebekon kaj Ontarion dum 2 ½ semajnoj ĵus antaŭ la kongreso, ni ne plu deziris aldoni kilometrojn. Ni do anstataŭe faris kelkajn proprajn ekskursojn tra la urbo.

Ja Montrealo ĝuste proponis plurajn festivalojn dum tiu semajno : ĉefe estis unue la fino de la geja semajno, kaj poste indiĝena festivalo. Ni ankaŭ biciklis en la insuloj sude de la urbo.

Alia tradicia programero estas la ebleco sekvi kurson de la loka lingvo. Ĉi-jare eblis do sekvi kurson de la franca, sed ankaŭ de la aniŝinabeka, loka indiĝena lingvo. Mi provis, sed mi devas konfesi ke mi ne multe memoras, ĝi ja estas lingvo tre for de tiuj kiujn mi konas. Mi nur diru: 'miigwech' (dankon).

Same tradiciaj estas la bankedo (ja de la tipo iom kosta, kaj malrapida, tiel ke mi evitas tiun programeron) kaj samvespere okazas la balo (se vi ne iras al la bankedo, eblas

ekdanci pli frue). Tie estis bona etoso. En la komenco estis viva klezmera muziko, laŭ kiu ne ĉiam evidentis kiel danci, sed ja eblis. La sekvon prizorgis Linda Le Nepveu, kiu bonege elektis sinsekvon de registritaj kantoj.




Refojan dankon al ŝi !

La aliajn vesperojn, kaj foje aldone posttagmeze, ĉiam estas abunda oferto de kulturaj programeroj. Dimanĉe vespere okazas la Nacia Vespero. Multnacia fakte ĉi-jare: kun artistoj indiĝenaj, ambaŭ 'indianoj' kaj 'inuitoj', kaj franc-kanadanoj, kaj de aliaj kulturoj ĉar ja Kanado daŭre akceptas enmigrantojn. Fine ĉiuj kune, miksante elementojn indiĝenajn, dervîŝajn, kaj aliajn. Mi sekvis ankaŭ tre diversajn koncertojn, vere bonkvalitajn. Inter alie de kanadaj longdaŭraj artistoj, kiuj pli lastatempe malkovris Esperanton kaj entuziasmiĝis, nome Joëlle Rabu + Nico Rhodes (Tutkore), Armel Amiot (Banĝo-Esperanto), Kristina + Stefano Miroshkina (Nova Sento), Yves Desrosiers (Nokta Ŝoforo). Okazis teatraĵo pri la vizito de Zamenhof en Norda Ameriko. Eĉ kun volontuloj surloke 'dungitaj', kiuj devis roli kiel homoj kiuj tiam pridemandis lin. Kaj fine la Internacia Vespero, kiam partoprenantoj de la kongresoj, strikte elektitaj, prezentas siajn talentojn.

Pro frua foriro, mi maltrafis tiujn lastajn kulturajn prezentojn, kaj la aŭkcion. Tiu ĉi ĉiam okazas vendredon posttagmeze. Ĝi ĉiam estas tre inda programero. Kompreneble ĝi iomete subtenas finance UEA, kiu tion tre bezonas, sed ĝi ankaŭ estas vera spektaklo, dank'al Humphrey Tonkin kiu tiom vigle kaj sprite gvidas la aŭkcion. Ja granda parto de la objektoj estas malnovaj libroj, kaj tion ankaŭ eblas akiri en nia biblioteko, el kiu ni provas forigi kio vere neniun plu interesas. Koran dankon al tiuj kiuj dediĉas tempon al tiu 'arkeologia' esplorado!

Kaj kiel informiĝi pri ĉio tio dum la kongreso? Per la Kongresa Kuriero, kvarpaĝa gazeto kun freŝa eldono ĉiu-matene. En Montrealo ĝi portis la nomon Kongresa Sciulo.

La listo ne povas esti kompleta. Mi ne parolis pri la Tago de Lernado, pri la KER-ekzamenoj, pri la Ekumena Diservo, pri la Esperantologia Konferenco, pri la Internacia Esperanto-Ĥoro, pri la Libroservo, pri la Kongresa Butiko, pri la apo de la kongreso, pri la kongresa kinejo, pri la belartaj konkursoj, pri la literaturaj projektoj de Bobelarto…

Kaj ne estas nur programeroj, ankaŭ eblas retrovi forajn amikojn, aŭ la belgojn kiujn ni ne sufiĉe ofte kontaktas cetere, kaj malkovri novajn interesajn homojn, ĉio tio partoprenas en la sukceso de UK.




Do pripensu partopreni la venontjaran, en Torino, Piemonto, Italio. https://www.esperanto.it/torino2023/

Aŭ alian kongreson, se vi preferas etoson pli junularan, aŭ familian, aŭ ferian, ktp. Ekzistas plej diversaj aranĝoj !

*Verkis kaj fotis Bernard-Regis Larue*

# Ĉu vi konas la bestojn de la savano?



## Ĉu vi konas la bestojn de la Ĝangalo?




Solvoj en paĝo 16-a

***Karaj samideanoj,***

*Denove ĉi-jare*

***nia klubo daŭre nepre bezonas vian subtenon,***

*bonvolu nepre membriĝi aŭ rekotizi senprokraste kaj varbi !*

*Do, pagante vian kotizon kaj varbante novajn membrojn, lernantojn,*

*vi helpos nin plu vivigi kaj pli vigligi nian 115-jaran klubon.*

***Nova en 2023***

*Post proveldonoj en 2022, ekde tiu ĉi jaro 2023 ni rekomencos*

*eldoni nian revuon AKTUALA po 4 numeroj en jaro.*

*Ne forgesu krompagi la abonon por la* ***presita versio.***

***Por ricevi retan AKTUALA-n nepre sendu vian retpoŝtadreson al***

*nikolao@esperantobruselo.org*

*Se vi havas ideojn, raportojn, artikolojn aŭ alian materialon por meti en la revuon*

*nepre ne hezitu kaj skribu al ni : aktuala@esperantobruselo.org*

*• Ne forgesu konsulti nian kalendaron sur nia retejo, ĉe eventaservo.org kaj mi ankaŭ memorigas al vi ke eventoj ankaŭ estas montrataj sur nia Fejsbuk-paĝo, ĝin ne forgesu viziti kaj aboni. Ne hezitu enmeti viajn komentojn kaj proponojn en nia Fejsbukpaĝo : « esperantobruselo ».*

*Cetere vizitu la diskutlistan grupon kaj aliĝu al ĝi :*

*groups.io Esperanto-en-Bruselo*

***Ne forgesu averti nin se vi translokiĝis/as.***

***EBG deziras al vi belajn kaj memorindajn festojn***
***kaj kompreneble bonan Novjaron 2023.***

***Nikolao***

*nikolao@esperantobruselo.org*
*Retejo EBG : www.esperantobruselo.org*
*groups.io : Esperanto-en-Bruselo*
*Fejsbukpaĝo : esperantobruselo*

VI TROVOS NIAN KALENDARON SUR NIA RETEJO AŬ MUSKLAKANTE SUR ESPERANTO KALENDARO

# Kotizoj 2023

*EBG peras kotizojn al V.Esp-o, FEL aŭ UEA **nur por siaj propraj membroj kaj ĝis plej laste la fino de Februaro**!*

***Se vi volas presitan revuon ne forgesu la kromajn kodon kaj pagon. Ekz. : MEM+PAK = 15+9 = 24 €***

| N-ro | Kodo | Kategorio | Kotizo | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| | | **ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO 2023** | | |
| 11 | **MEM** | Membro de EBG | 15 € | Reta « Aktuala » Partopreno en la vivon de la Grupo Por ricevi retan AKTUALA-n nepre sendu vian retpoŝtadreson al nikolao@esperantobruselo.org |
| 12 | **MEM-J** | Membro - **J**unulo (< 26-jara) | 10 € | |
| 13 | **MEM-P** | Membro - **P**ensiulo, senlaborulo | | |
| 14 | **FAK** | Familia kunloĝanto | 4 € | Partopreno en la vivon de la Grupo |
| 15 | **+KUR** | **!! Aldona** kotizo por **kursanoj** | **+20 €** | Kurso + materialoj |
| 18 | **DVM** | Dumviva membro de EBG | 375 € | Membreco kaj presita « Aktuala » dum la tuta vivo |
| 19 | **+PAK** | **!! Aldona** pago por **presita Aktuala** | **+9 €** | Krompago por ricevi presitan version de Aktuala |
| 20 | **+PAK-E** | **!! Aldona** pago por **presita Aktuala** ekster Belgio | **+18 €** | Krompago por ricevi presitan version de Aktuala ekster Belgio |
| | | **BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ 2023** | | |
| 22 | **FEL** | Abono al FEL-a revuo | 30 € | Abono al Horizontaal" (**NL**/Eo) |
| 25 | **A-MEM** | Membro plenkreska de V.Esp-o (antaŭe APE ) | 25 € | Plenkreskula membreco V.Esp-o (=APE) **kun revuo** « Esperanto en Marche » |
| 26 | **A-JUN** | Membro juna (< 25-jara) de V.Esp-o (antaŭe APE) | 12 € | Junula membreco V.Esp-o (=APE) **kun revuo** « Esperanto en Marche » |
| 27 | **A-FAM** | Familia kunloĝanto de V.Esp-o (antaŭe APE) | 5 € | Kunloĝantomembreco de V.Esp-o (=APE) **sen revuo** |
| 28 | **A-REV** | Abono al V.Esp-o (APE)-a revuo | 12 € | **Nur** la ĉiutrimonata revuo « Esperanto en Marche » |
| | | NB : APE la Valona Asocio ŝanĝis sian nomon kiu nun estas : **V.Esp-o** | | |
| | | **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO 2023** | | |
| 41 | **SA** | Simpla abonanto de "Esperanto" | 45 € | Abono al papera versio de « Esperanto", la monata organo de UEA |
| 42 | **Kto** | Simpla abonanto de "Kontakto" | 25 € | Abono al paperaversio de « Kontakto", la junulara revuo de TEJO |
| 43 | **MB** | Membro-Baza UEA | 44 € | Membro Baza, kun reta aliro al UEA-servoj: **reta revuo Esperanto**, Delegita Reto (**reta** jarlibro). |
| 44 | **MA** | Membro-abonanto UEA | 74 € | Membro-Abonanto, kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la **revuon Esperanto papere**. |
| 45 | **SZ** | Membro de Societo Zamenhof | 148 € | Membro de Societo Zamenhof, kiu volas finance apogi Universalan Esperanto-Asocion.(2x MA) |
| 46 | **DMB** | Dumviva Membro-Baza UEA | 1320 | Kiel MB, sed dumvive (30x MB) |
| 47 | **DMA** | Dumviva Membro-Abonanto UEA | 2220 € | Kiel MA, sed dumvive. (30x MA) |

***NOTOJ : Pagu al la bankkonto IBAN : BE87 5230 8055 0794, BIC : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo***

*Por efike subteni nian agadon, estas konsilinde membrigi ankaŭ siajn familianojn, se ili ne kontraŭas Esperanton !*

*EBG peras kotizojn al V.Esp-o, FEL aŭ UEA **nur por siaj propraj membroj kaj ĝis plej laste la fino de Februaro**!*

*Nepre indiku la celon de via pago per literaj [aŭ ciferaj] kodoj, ekz. « MEM+2x FAK » aŭ « 11, 2x14 »*

*La JARLIBRO de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj.*

# Tutbelga Zamenhoffesto en Ostendo (17-Dec-22)

Post du jaroj sen Zamenhoffesto pro la pandemio, ni ja ĉi foje, espereble ĉiuj kune, festos la kreinton de Esperanto en ĝoja etoso.

La renkontiĝo okazos en la **Ontmoetingscentrum De Boeie, Kerkstraat 35, Oostende**

## Aliĝo ĝis la 1a de Decembro 2022!

***Programo de la tago***

- **Grupa foto**
- **Aperitivo** - La Konko ofertas!
- **Komuna manĝo** (bufedo)
- **Paroladoj** kaj kantado de la himno
- **Senkrokodila tablo** por komencantoj! (kun akompano de fluparolantoj)
- **Libroservo** (ne forgesu fari mendojn por kolekti ilin en la Zamfesto)
- **Tombolo**

La kotizo de 27 € ne inkluzivas la trinkaĵojn.
La bufedo okazos je la 13h.
Verpermanĝon ĝi do **ne inkluzivas**.

Fiŝosupo el Norda Maro

Potirona-karota supo kun kokoslakto (vegana alternativo)

***

Kokidaĵo laŭ la orienta kuirarto kaj rizo

Kokida brustaĵo kun fungosaŭco kaj verdbrasika-karota mikspoto

Surogato de viando kun sortimento da legomoj (vegana)

***

Tiramisuo el ĉokolado kun brogita piro en oranĝsuko.

## Estu bonvena en Ostendo!

En la monato decembro ĉiu luma dekoracio estas ŝaltita en la centro de Ostendo! Kaj estas tiom multe por viziti, aŭ eble nur por promeni.

De la komerca centro "de Kapellestraat", poste laŭ la "Vlaanderenstraat" rekte al la "Albert 1-promenade" (la digo). Ĉi tiu troviĝas tre proksime de "De Boeie".



Ni rekomendas la jenan eventon: [Winter in het Park]

Aparte vizitinda turisma allogaĵo estas la [domo de James Ensor.]

Nomoj de la bestoj de la paĝo 12 kaj 13

**Bestoj de la Savano** : 1. Gnuo – 2. Ĝirafo – 3. Elefanto – 4. Hieno – 5. Hipopotamo 6. Krokodilo - 7. Zebro – 8. Simio – 9. Gepardo – 10. Antilopo – 11. Leono - 12. Rinocero

**Bestoj de la Ĝangalo :** 1. Bradipo – 2. Migalo – 3. Skorpio - 4. Formikurso – 5. Papago 6. Dazipo - 7. Ĉimpanzo - 8. Tukano - 9. Kameleono – 10. Boao – 11. Gorilo – 12. Tapiro

# Taja salato kun mango kaj rostitaj salikokoj

*Facila recepto*

*Por 4 homoj*

*Preparado: 20 minutoj*

*Kuirado : 5 minutoj*



## Ingrediencoj:

- 20 grandaj salikokoj sen kapo
- 1 mango matura, senŝeligita
- 2 manplenoj da sojoŝosoj
- 3 etaj kukumoj, hakitaj
- 1 fasketo da freŝa koriandro, plukitaj folioj
- 1 ruĝa kapsiko, sengrajnigitaj kaj fajne trancitaj rimene
- 1 fasko da ciboloj, hakitaj
- Mar-salo
- 1 manpleno de sezamgrajnoj
- Olivoleo ekstra virga

## Por la marinaĵo :

- 1 peco da freŝa zingibro dika kiel dikfingro, senŝeligita kaj raspita
- 1 fasketo da freŝa koriandro, folioj plukitaj kaj hakitaj
- 1 freŝa ruĝa pimento, sengrajnigita kaj hakita
- 4 supkuleroj da freŝa limeosuko
- 3 supkuleroj da olivoleo ekstra virga
- 1 supkulero da sezamoleo
- 1 supkulero da sojosaŭco
- 1 pinĉaĵo da bruna sukero
- 1 ajlero senŝeligita kaj piŝtita

Jen tre agrabla salato kiu estas facila kaj tre bongusta.
Ĝi tre taŭgas kiel enirplado en festo tago.

**Bonan apetiton !**

## Preparado :

Prenu pikstangetojn kaj sur ilin survicigu po 5 senŝeligitajn salikokojn. Por la marinaĵo, miksu ĉiujn ingrediencojn kaj priverŝu la salikokojn per duono de la marinaĵo.

Por la salato, senkernigu la mangon kaj trancu ilin en fajnaj rimenoj. Miksu ilin kun la dua duono de la marinaĵo, la sojoŝosoj, kukumoj, koriandro, pipro, ciboloj kaj iom da mar-salo.

Rostu sengrasaĵe en granda pato la sezamgrajnojn ĝis ili bele oriĝas. Forprenu kaj flankenmetu ilin. Fritu la salikokojn dum 2 minutoj ĝis plena kuiriĝo.

Dispartigu la salaton sur 4 telerojn kaj aldonu po unu pikstangeton.

*Verkis Nikolao de Buyl*
*Fonto ne plu konata.*

# Kongreso de fervojistoj / amikoj de fervojoj



**En Antverpeno**




De la 6a ĝis la 12a de majo 2023
**Flandra Esperanto-Ligo** kaj **BAFE** (Belga Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj) organizas la internacian IFEF-kongreson, la kongreson de la **Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj**.

Je tiu okazo ni volas montri al internacia publiko kion Flandrio povas proponi al la mondo kaj ne nur koncerne publikan transporton.

Vi trovas ĝisdatajn informojn kaj aliĝilon en la retejo: https://www.ifef2023.net/

**Postkongreso en Charleroi**

De la 12a ĝis la 15a de majo 2023 sekvas
**postkongreso en Valonio kun Charleroi kiel deirloko**.

Ni kore invitas partopreni kaj tiel eklerni ion pri publika transporto kaj ĉefe renkonti alilandajn esperantistojn.

Papera versio de la aliĝilo de la IFEF-kongreso troveblas en la novembra numero de Horizon-taal. Reta versio de la aliĝilo troveblas en la retejo.

Notu ke **BAFE-membroj** por la kalendara jaro 2023 ricevos rabaton. Via membrokotizo eĉ kostas malpli ol la profito kiun vi akiras, estante BAFE-membro. Vi povas membriĝi en BAFE-n per transpago de la kotizo al konto BE85 6105 5937 1106 nome de BAFE - Margaretha Symoens.

La kotizo estas:

- € 10 por membreco kun elektronika revuo
- € 16 por membreco kun papera revuo

Ligilo al la (reta) aliĝilo por la postkongreso troveblas sub https://www.ifef2023.net/

Memortenu ke la **1a aliĝperiodo kun la plej malaltaj kotizoj finiĝas je la jarfino.**

Koran bonvenon. Ĝis tiam?

*Kristin Tytgat*

*Nome de LKK IFEF 2023*

# Nia plantangulo

## Borago oficina

*Borago officinalis L.*

- *Bernagie*[NL]
- *Bourrrache*[FR]
- *Boretsch*[DE]




*Borago estas unujara herbo, familio : boragacoj, 45 ĝis 90 cm alta, kun ĉielbluaj/kobaltbluaj steloformaj floroj de 20-25 mm, kiuj ravas nin de Majo/Junio ĝis Oktobro (aŭtuno).*

*Ĝin vizitadas abeloj kaj burdoj. La koloro asocias kun suno, sudan maron. La malhelaj stamenoj, purpur-nigraj, forte kontrastas.*

*La hirtaj folioj kreskas ĉe fortikaj kavaj tigoj, kiuj enhavas kukum-odoran sukon.*

*Borago kreskas sur vojflankoj, forlasitaj grundoj kaj, pli kaj pli, oni ŝatas ĝin en ĝardenoj. La plantoj revenas ĉiujare samloke ĉar la semoj falas proksime de la ĉefplantaĵo kaj facile ĝermas.*

***Kuirarto**: ni manĝas ĝiajn junajn foliojn en salato, en kazeo… aŭ miksite en stufanta spinaco. Kunkuirante kelkajn foliojn kun brasiko, ĝi plifortigas ties guston. Aldonante borago en trinkaĵon, tiu-ĉi akiras kukumecan odoron.*

*Tial en pluraj lingvoj la vorto « kukumo » aperas en la popolnomo de la planto.*

*Sed ĉefe la floroj ricevas laŭdojn: ili estas manĝeblaj kaj ekde Mezepoko ornamas ne nur legompladojn, sed ankaŭ desertojn, tiam la floroj estas dolĉigitaj.*

*La aldono « oficina » signifas ke la planto taŭgas por medicina uzo : interalie: tizano el floroj, kiu kvietigas kaj ĝojigas, jam la Grekoj anoncis tion. Sekigite la planto perdas sian efikon. El la semoj, oni elpremas oleon, por ekstera uzo (prizorgado de sekaj haŭtoj).*

*Ĉu vi ĝardenumas ? Avantaĝoj : Fragoj profitas la najbarecon de borago, kaj helikoj evitas la planton. Krome borago estas uzebla kiel verda sterkaĵo.*

***La autorino aldonas :** Foti tian planton ne estas facila afero : la pendantaj floroj devigas vin genuiĝi por akiri taŭgon angulon.*

*Aliaj plantoj uzataj kiel verda sterkaĵo estas lupeno, blanka sinapo, trifolio, furaĝa rafano…*

*Por fari verdan sterkaĵon, la tipa planto, Phacelia, estas samtempe abelo[1]-paradizo.*

Verkis kaj fotis Lydia BUYST. Foto Lydia Buyst

[1] https://eo.wikipedia.org/wiki/Abelo




En la unua parto ni vojaĝis de Montrealo al Niagara tra parto de Usono,

kaj de tie al Lago Saint-Jean (Sankta-Johano) kaj al la fjordo de Saguenay.

En tiu dua parto ni do vizitos Tadoussac, kaj de tie revenos laŭ la riverego Saint-Laurent (Sankta-Laŭrenzo) al Montrealo kaj al la UK.

Kiel kutime mia vojaĝo estis tre densa. Mi do tiam prezentos la duan duonon.

## Baldaŭ la Babilemaj ... Nudeloj en Perle de Siam

Post la vesperaj « Babilemaj Spagetoj » kiuj okazis antaŭ la pandemio, ni startas novan serion kiu estos iom malsama en la senco ke ili ne plu okazos nur vespere en unu nura loko, sed estonte kelkfoje tagmeze (ĉar iuj personoj ne ŝatas veni en la urbon kiam malheliĝas) kaj kelkfoje vespere, kaj plie de nun en variaj lokoj.
Ĉifoje ĝi okazos tagmeze en la centro de Bruselo, **vendredon la 9an de Decembro** je la 12:15 en la taja restoracio




**Perle de Siam**,
Pl. Saint-Géry 37, 1000 Bruselo.

Tramoj 3 aŭ 4, **Bourse/Beurs** (100m) aŭ Metrooj 1 aŭ 5, **De Brouckère** (600 m).

Nepre rezervu via(j)n loko(j)n ĉe nikolao-ĉe-esperantobruselo.org plejlaste ĵaŭdon la 8an je la 12a horo